

Ekumenaj Bibliaj Tagoj kun la kantaro Adoru en Vroclavo

Oldřich Arnošt Fischer – Gabriella Stier

Prelego por Esperantista Klubo en Brno, la 13-an de majo 2015

Antikva kaj glora pola urbo Vroclavo, estis loko, kie de la 15-a ĝis la 19-a de aprilo 2015 okazis ekumenaj Bibliaj Tagoj kun la kantaro Adoru. Domo nomata Notre Dame en la strato de Sankta Marteno apartenas al Kongregacio de Fratulinj de Notre Dame. Programo por 46 partoprenantoj el ok eŭropaj landoj (AT, CZ, DE, IT, NL, PL, RO, SK) estis bonege preparita danke al Teresa Pomorska, muzikisto Stefan Lepping kaj aliaj geperantoj.

Nia veturado el Brno al Vroclavo daŭris ses horojn. Ni veturis el Brno trans Blansko, Svitavy, Česká Třebová, Ústí nad Orlicí, Letohrad kaj Kłodsko.

Merkrede vespere la partoprenantoj aŭskultis interesan rakonton de estrino de la Notre Dame kaj pastro Stanisław Pawlaczek pri fondado de la Domo, poste ĉiu el ili prezentis sin al la aliaj. La unua Esperanto-grupo en Vroclavo (tiamnome Breslau) estis fondita jam en la jaro 1905. En la jaroj 1907 – 1909 formiĝis kristanaj (evangelianaj kaj katolikaj) grupoj. En la jaro 1961 okazis en Vroclavo la 16-a Tutpollanda Esperanto-Kongreso, kiun partoprenis 650 personoj.

Ĵaŭde, vendrede kaj sabate la tago komenciĝis per rozaria preĝo je la 7-a horo kaj sankta meso en la kapelo. Komuna matena preĝo kaj matenaj laŭdoj malfermis novan tagon, kiu alportis al ĉiuj partoprenantoj novajn travivaĵojn en amika etoso.

Post matenmanĝo kaj komuna kantado komenciĝis prelegoj pri Apokalipso. Lasta libro de Nova Testamento, la Apokalipso de Johano, vere ne estas facila legado. En la teksto pri revelacio de Johano estas multe da simboloj, preskaŭ ĉiu vorto povas enhavi sian kaŝitan sencon. Sed ambaŭ prelegintoj, pastro Wilibald Kunigk kaj pastoro Wolfram Rohloff, bravure gvidis nin trans ĉapitroj kaj versoj. Jes, nuna mondo estas endanĝerita de militoj kaj katastrofoj – iu trafe rimarkigis, ke apokalipsaj ĉevalrajdistoj el Apokalipso de Albrecht Dürer daŭre havas freŝe nigran koloron. La Sankta Biblio donas al ni esperon kaj montras al ni la Savon.

Tagmanĝoj kaj ĉiuj aliaj manĝaĵoj prezentis al ni sanan polan kuirejon – poloj vere scias bonguste kuiri! Posttagmeze kaj vespere ni povis ekkoni belegan urbon, kiu estas la kvara urbo en Pollando laŭ grandeco. Tie loĝas pli ol 630 miloj da loĝantoj. La urbo situas ĉe la bordo de la rivero Odro, ĝi havas 12 insulojn kaj 112 pontojn. Malnova urbodomo estis konstruita en la jaro 1534. Universitata urbo Vroclavo estas administracia, ekonomia kaj kultura centro de la Malsupra Silezio. Ĝi havas 24 teatrojn, 16 muzeojn kaj 32 galeriojn. La dua mondmilito kaŭzis grandajn damaĝojn al la tuta urbo. Nekredeble, ke belegaj lokoj, kie ni promenis, antaŭ 70 jaroj estis preskaŭ ruinoj. La urbofiero estas Katedralo de la Sankta Johano la Baptisto, kies du turojn oni vidas preskaŭ el ĉiu loko en Vroclavo. En la jaroj 1822 – 1850 en Vroclavo vivis fama ĉeĥa kuracisto (patologo, fiziologo) kaj natursciencisto Jan Evangelista Purkyně (1787 – 1869), kiu estis profesoro de la Universitato de Vroclavo kaj faris tie siajn plej signifajn eksperimentojn kaj malkovrojn.

Ĵaŭde ni trarigardis preĝejon de Sankta Maŭricio kaj vespere Miroslav Šváček prezentis videojn de Bibliaj Tagoj en Tuchoměřice kaj Ekumenaj Esperantistaj Kongresoj en Vroclavo kaj Trento-Cadine.

La partoprenantoj ricevis donacon, la libron Regulon de Benedikto. Ili povis aĉeti tekston de satira komedio de Blanka Fišerová „Ĉerkoturneo“. Unu persono de la komedio, malsprita urbestro, ateisto, ordonas al sia sekretariino trovi rapide koncizan enhavon de la tuta Biblio sur interreto...

Vendrede ni vizitis sinagogon, kie interpretis Anna Skudlarska, kaj liturgion pri muziko en preĝejo de Sankta Nikolao, kun interesa prelego de pastro Aleksander Radecki, kiun esperantigis Stanisław Śmigielski. Gitaristo Patryk Filipowicz ĝojigis nin ne nur per sia belega muziko, sed ankaŭ per sia sincera emo eklerni bone esperanton.

Sabate ni vizitis Katedralon de Sankta Johano Baptisto sur Katedra Insulo (Ostrów Tumski). Arkidieceza Muzeo, kiu estas la plej malnova muzeo en Vroclavo, gardas historian kontinuecon – ekde pli ol 100 jaroj ĝi kolektas antikvaĵojn de la preĝeja arto, kiuj – retiritaĵoj el la kulta utilo – enhavas daŭre grandegajn historiajn kaj altajn valorojn. Inter ili troviĝas la fama „Kroniko el Henryków“ el la 13a – 14a jarcentoj, kiu enhavas la unuan frazon skribitan en pola lingvo. En Vroclavo estas ĝis nun sentebla spirito de papo Johano Paŭlo la 2-a, kiu kuraĝigis naciojn de orienta Eŭropo al batalo kontraŭ totalismaj reĝimoj. En la jaro 2009 en Alta Porpastra Seminario en Vroclavo okazis la 19-a Ekumena Esperanto-Kongreso.

Bedaŭrinde la tempo en Vroclavo pasis rapide kaj jam alvenis sabata adiaŭa vespero. Surprizo estis prezentado de loka muzika grupo Demolo, kies kantisto Wojtek Ławnikowicz bonege kantis pole kaj esperantlingve.

Dimanĉe ni partoprenis esperantlingvan sanktan meson en preĝejo de Sankta Marteno. Apokalipso estas signifa temo, kiu meritas nian atentemon. Danke al oferema laboro de organizintoj de la Bibliaj Tagoj en Vroclavo 2015 ni iomete proksimiĝis al la Vero.

Rekomendita literaturo

- AŬTORA KOLEKTIVO (1993): Bible. Písmo svaté Starého a Nového zákona (včetně deuterokanonických knih). Ekumenický překlad. 3-a eldono, Český Těšín, Česká biblická společnost 1993, 283 paĝoj. [*Biblio. La Malnova kaj Nova Testamentoj kun la Duakanonaj Libroj; ĉeĥe*]
- AŬTORA KOLEKTIVO (2006): Biblio. La Malnova Testamento tradukita de Ludoviko Lazaro Zamenhof kun la Duakanonaj Libroj tradukitaj de Gerrit Berveling. La Nova Testamento tradukita de la Brita Komitato (John Cyprian Rust, B. John Beveridge, C.G. Wilkinson). 1-a eldono, IKUE kaj KELI, Dobřichovice, Kava-Pech 2006, 1375 paĝoj. [*esperantlingve*]
- BENEDIKTO (2015): La regulo. 1-a eld., Ta Rijswijk, Voko, Voĉoj Kristanaj 30, 87 paĝoj (*el latina lingvo esperantigis Gerrit Berveling*).
- BLAŽEK, P. (2012): Československo a polská krize 1980-1981. Securitas Imperii, 20: 1-18.
- FIŠEROVÁ, B. (2015): Ĉerkoturneo. 1-a eld., Brno, MSD, 58 paĝoj (*el ĉeĥa lingvo esperantigis Oldřich Arnošt Fischer*). ISBN 978-80-7392-242-9.
- FISCHER, O.A. (2013): Libro de libroj, <http://www.medy.cz/brno-esperanto/fischer-libro-de-libroj.pdf>.
- FROSSARD, A. (1990): Portrét Jana Pavla II. 1-a eld., Prago, Zvon, 96 paĝoj.
- HORA-HOŘEJŠ, P. (1997): Toulky českou minulostí. VI. Příběhy a postavy českého národního obrození. 1-a eld., Prago, Baronet kaj Via facti, 230 paĝoj.
- IKUE KAJ KELI (2001): Adoru, Ekumena Diserva Libro, 1-a eld., Ponto, CIP-Titelaufnahme der Deutsche Bibliothek, 1422 paĝoj. ISBN 3-9803793-5-3.
- URZĄD MIEJSKI WROCŁAWIA / MAGISTRATO DE VROCLAVO (2009): Ni renkontiĝu en Vroclavo! 1-a eld., Wrocław, Biuro Promocji Miasta / Oficejo de Urbodomo, 23 paĝoj.
- ŠVÁČEK, M., ŚMIGIELSKI, S., DEMBIEC, B. & RUSS, W. (2009): Kongresa Libro de la 19-a Ekumena Esperanto Kongreso (la 62-a de IKUE, la 59-a de KELI), Vroclavo, 18 – 25 julio 2009. 1-a eld., Wrocław, Silezia Esperanto-Asocio, 64 paĝoj.

Ĉefa fervojstacidomo en Vroclavo (Wrocław Główny)



1

Domo Notre Dame



2

Ĝardeno de Notre Dame



3

Kapelo en Notre Dame



4

Kantado laŭ kantaro Adoru



5

Stefan Lepping, Helga-Vanessa Tontea, Mária László, Gabriella Stier



6

Pastro Wilibald Kuniĝk prelegas pri Apokalipso



7

Neformala diskuto dum kafuma paŭzo



8

Prelego de pastoro Wolfram Rohloff



9



Pastoro Wolfram Rohloff

10

Kajo de la rivero Odra



11

Preĝejo de Sankta Kruco kaj Katedralo de Sankta Johano Baptisto



12

Arheologa esploro



13

Metropolita Alta Porpastra Seminario en Vroclavo



14

Kolomba nesto sur statuo de Kristo



15

En la sinagogo interpretis Anna Skudlarska




16

Tora




17

Gabriella Stier en sinagogo



18

En sinagogo



19

Monumento de sovetiana krimo en Katyn, kie en la jaro 1940 sovetianoj murdis 22 500 polajn oficirojn



20

Gitaristo Patryk Filipowicz



21

Patryk Filipowicz, Stefan Lepping kaj Teresa Pomorska



22

Koncerto de la muzika grupo Demolo, kantas Wojtek Ławnikowicz



23

Koncerto de la muzika grupo Demolo, ludas Wojtek Ławnikowicz



24

Grupo de kelkaj partoprenantoj (fotis Stefan Lepping)



25

Katedralo de Sankta Johano Baptisto



26

Fotis la aŭtoro